



Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

N-ro 1
1965

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
ĈEFREDAKTORO : JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-a periodo
31-a (37-a) jaro
Monata

Nordlanda Esperanto-Kongreso en Oslo 1965

DUA INFORMILO

1. *Aliĝiloj* estas senditaj grandnombre al ĉiuj 5 esperanto-asocioj en la nordaj landoj. Ĝi enhavas rubrikojn por aliĝo al la kongresaranĝoj ĉiuspecaj kaj dorsoflanke ĝi donas detalojn pri la kongreso kun provizora tagprogramo, pri la loĝiga servo kaj pri la ekskursoj kun prezoj.

2. *Glumarkoj* estas haveblaj kontraŭ antaŭpago al la Loka Kongresa Komitato, adreso Postboks 942, Oslo. La prezo por 1 folio kun 20 glumarkoj estas n. kr. 0,80 aŭ 1 int. respondkupono (inkl. afrankon). (Vidu p. 5.)

3. *Kongreskotizoj*: N.kr. 20 + ferma festeno n. kr. 15, entute n. kr. 35 (sed junulo, edzino, blindulo pagas 10 + 15 = 25) sendota al poŝtĝirokonto 20.1742 aŭ bankĝirokonto 117.153/40.

4. *Kongresaliĝoj*: Jam alvenis aliĝoj - aŭ petoj pri informoj pri la kongreso - de esperantistoj en Francujo, Germanujo, Nederlando kaj Polujo, kaj ni atendas partoprenadon de esperantistoj el multaj aliaj landoj ekster la nordaj landoj. Kvankam

la kongreso ja estas aranĝo por la 5 nordaj landoj, ni antaŭvidas la viziton de fremdlandaj esperantistoj. Sed mi povas akcepti nur ĝis 400 partoprenontoj entute, kaj la hotelsituacio en Oslo somere estas tre malfacila, tiel ke estas nepre necese aliĝi al la kongreso kaj mendi lokon tiel frue kiel eble.

5. *Ekskursoj*: La anoncitaj 3 postkongresaj ekskursoj iras laŭlonge de la plej ŝatataj — kaj belaj — vojoj en Norvegujo, kaj tio ankaŭ signifas mendon de loko sufiĉe frue.

6. *Festkunveno* okazos en la Aŭlo de la Universitato en Oslo, kun festprelego de prof. Ivo Lapenna kaj kun artista programo altkvalita, interalie prezentado de «Morto de Aase» el Peer Gynt de Henrik Ibsen en esperanto.

7. *Malfermo* de la kongreso okazos dum la Interkonatiĝa vespero 19/6, kiu estos en la festĉambrego de la restoracio Carl Johan (Oslo Handelsstandsforening) kun iom da distra

(daŭr. p. 5)

POR NOVULOJ KAJ LERNEMULOJ

Red.: H. Fridén

Bali, la insula paradizo.

(El Ĉirkaŭ la mondon kun la verda stelo de Joseph R. Scherer)

Ankoraŭ briletis la sudaj steloj, kiam mi kaj aliaj turistoj kolektiĝis sur la ferdeko, ĉi-foje ne por admirati tropikan sunleviĝon, sed por saluti insulan paradizon.

Eĉ la plej glora sunleviĝo en la mondo ne povus altiri iun atenton, kiam en la distanco salutas la piramidaj pintoj de Bali.

Bali! Vorto magia inter la malmultaj mondvojaĝantoj, al kiuj ĝis nun estis eble viziti la feliĉan insuleton oriente de Javo.

Bali! Nomo konata al ĉiuj javanoj; nomo menciata kun mistera respekto; prononcata kvazaŭ ĝi signifus «Eterna Feliĉejo».

Kiam en Surabajo mi aĉetis mian ŝipbileton al Bali, mi sentis kvazaŭ mi akiris ŝlosilon al la paradizo. Ĉar tiom mi estis leginta pri la feliĉa popolo, pri la feinaj virinoj, pri la senkomparaj pejzaĝoj, ke certe nur surtera paradizo povus instigi je tiom da entuziasmaj kaj laŭdaj vortoj.

Sep altaj vulkanoj leviĝas sur la insulo. La plej alta, sur kies 3 000 metroj loĝas la dioj de la mondo, ĵus kaptis la unuajn sunradiojn. Ĝi estis la reĝo de la montoj: estis la glora «Pinto de Bali». Tuj poste lumiĝis ankaŭ la aliaj pintoj. Ili aperis kiel arĝentaj piramidoj naĝantaj sur orumitaj nuboj.

Vortklarigo:

ferdeko — skipsdekk
sun-lev-iĝo — soloppgang
insula paradizo — øyparadis
atento — oppmerksomhet

pinto — tind, topp, spiss
oriente de — øst for
prononci — uttale
kvazaŭ — som om
tiom — så mye
estis leginta — hadde lest
feinaj virinoj — feaktige kvinner
sen-kompar-a — makeløs, uten side-
stykke
pejzaĝo — landskap
sur-tera — jordisk
instigi — inngi, gi støtet til
lum-iĝi — å belyses
arĝento — sølv
naĝ-antaj — svømmende
or-um-ita — forgylt

5-kronrulado al la Informfondaĵo de N.E.L.

Listo 4:

Per Vasmoen, Tynset (50,-)	
S. Fjarli	Skorovvatn
R. Pettersen,	»
H. Gudding,	»
E. Christiansen,	»
S. Kloumann,	»
O. Helseth, Gjøvik	
K. Naklum, Gjøvik	
Birgit Normann, Oslo	
Nicolai Herlofson, Stockholm	
Magne Finslo, Gjøvik	
Lif Berg, Trondheim	
Elfrid Vormdahl, Oslo	
Ida Væka, Sauda	
Robert Rødsås, Sauda	
Majken Wagle Jørgensen, Bergen	
Annemor Jæger Bye,	»
Johan Dahl,	»
Nelly Bjørge Nilsen,	»
Agnes Hennemann,	»
Ashild Birkenes,	»
Doris Birkelund,	»

Entute 22.

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach,
Hans Amund Rosbach

Adreso de redakcio: Boks 942, Oslo

Abonprezo: En Norvegujo kaj ekster-
lando: n. kr. 8,—.

Anonprezoj: 1/1 paĝo kr. 150,—
1/2 p. kr. 75,—, 1/4 p. kr. 38,—
1/8 p. kr. 19,—.

Nova jaro

Ni ne povas malhelpi la rapidan forpason de la tempo. Sed ni povas forte helpi al la rapida progreso de Esperanto.

Ĉijare ni koncentriĝu pri la gravaj taskoj: kolektado de subskriboj al UNESCO, kolektado de mono al la Informa fako de NEL, la Nordlanda Kongreso en Oslo.

Sed ankaŭ multaj aliaj eblecoj kaj multaj aliaj taskoj atendas.

Feliĉan novan jaron!

Sciigoj de N.E.L.

Norvega Esperantisto. Se vi deziras eviti interrompon en la ricevado de la gazeto, ni varme petas vin bonvolu tuj pagi vian kotizon. — La *rektaj membroj* bonvolu tuj sendi sian kotizon al N.E.L., Boks 942, Oslo (poŝtgiro-konto 100.30), la *klubanoj* bonvolu tuj pagi sian kotizon al la kluba kasisto. Kaj al la *klubaj kasistoj* ni same varme petas: bonvolu *senprokraste* aktive ekagi por kolekti la kotizojn de la klubanoj, kiuj ankoraŭ ne pagis por 1965, kaj ĉiukaze sendi al ni liston kaj kotizojn por la jam

pagintaj klubanoj plej malfrue en la unua semajno de februaro. Antaŭan dankon!

Subtenantaj membroj. Ni petas ĉiujn membrojn, kiuj havas okazon por tio, anonci sin kiel subtenantajn membrojn de N.E.L. La kotizo estas kr. 30,00 por unu jaro. Klubano pagas kr. 17,00 aldone al sia klubkotizo.

Apogmembroj. Ni petas ĉiujn membrojn varbi apogmembrojn (kr. 5,00). Ĉi tiu kategorio celas neesperantistojn, kiuj estas pretaj apogi nian laboron per malgranda subteno; ili ricevas la jarraporton.

50-a Universala Kongreso en Tokjo 1965. Estas tempo aliĝi al la kongreso. — La skandinavia komuna flugkaravano trans la Nordan Poluson estas jam certigita. La vojaĝo kaj 3-semajna restado en Japanujo kostos kred-eble ĉirkaŭ n.kr. 7000,00, kiu inkluzivas ĉion. Petu Bultenon kaj aliĝilon de Turisma Servo de NEL, Boks 942, Oslo, kiu ankaŭ peras aliĝojn kaj mendojn.

Nordlanda Esperanto-Kongreso 1965. Kiel ni jam anoncis, la kongreso okazos en Oslo 19.—22. Junio 1965, kaj dum la kongreso okazos la landa kunveno de N.E.L. Pretigu vin jam nun por la partopreno. Aliĝiloj riceveblaj de N.E.L. Uzu la kongresan glumarkon sur viaj leteroj! Folio de 20 markoj kostas nur kr. 0,50 + afranko.

La kontorfondaĵo. Ni permesas al ni memorigi pri tiu grava donac-fondaĵo. Ĉiuj donacoj estas bona helpo por la ekonomio de N.E.L.

Taskotabelo por kluboj. La studvidanto kontrolas la laboron de la studrondoj kaj klopodas fondi novajn studrondojn. Antaŭ la 15a la sekretario sendas jarraporton pri la pasinta jaro al N.E.L. kaj al la distrikto (bl. A 11). La kasisto sendas skriban kotizpostulon al ĉiuj nepagintoj, kun plenigita poŝtĝirokarto aŭ poŝtmandato, informante ke post unu monato oni eventuale sendos poŝtan enkasigilon. Estrarkunveno planas la martajn kunvenojn.

Raporto de la Liga Estraro pri la 4a jarkvarono. Okazis 2 estrarkunvenoj. Oni dissendis 3 ĉirkulerojn al la kluboj, du el ili ankaŭ al la rektaj membroj (unu pri la kampanjo por kolektado de subskriboj al U.N.O. kaj unu kun invito pri donacabonoj de Norvega Esperantisto). Oni redaktis la norvegan tekston de la subskribblankedo al UNO, presigis la foliojn kaj dissendis ilin. La L.K.K. de la Nordlanda Esperanto-Kongreso energie laboradis, same la Financa Komisiono. Oni daŭrigis la klopodojn por reaperigi Esperanto-nytt. Oni aranĝis prelegvojaĝon en Suda Norvegujo por Akademiano F. Faulhaber. Oni interkonsentis pri utiligo de la matricaroj de nia gazeta kurso en la organoj de la nordlandaj abstinentaj fervojistaj organizaĵoj. Oni eldonis la Bibliografion de norvega literaturo tradukita en Esperanto (kompilitan de L. K. Hunnes). En Jørpeland inaŭguriĝis la unua Esperanto-vojo en Norvegujo, la televido raportis pri la inaŭguro.

La Liga Estraro.

Mia rondvojaĝo tra Norvegujo

Dum mia prelegvojaĝo tra Danujo prezentiĝis okazo viziti ankaŭ Norvegujon, kion mi jam longe deziris. Tie s-ro Støp-Bowitz aranĝis por mi similan vojaĝon, dum kiu mi parolis en Sauda, Haugesund, Skudeneshavn, Bergen, Oslo kaj Hamar. Miaj temoj estis lingvaj kaj literaturaj, Novaĵoj Esperantaj el Nederlando. Kaj por ke ankaŭ komencantoj havu utilon el niaj kunvenoj mi rakontis post la paŭzo amuzajn historiojn. Mi esperas ke tiel mi povis esti utila al vi ĉiuj.

En Haugesund la prezidanto de la grupo, s-ro Thormodsen, ĵurnalisto, intervjuis min, kaj lia raporto aperis poste en «Haugesund Avis».

En Bergen ĵurnalisto de «Dagen» intervjuis min telefone kun helpo de s-ino Jahren.

En Sauda kaj Oslo bonvenigis min nederlande ornamentaj salonoj, en Oslo sep knabinoj en nederlanda nacia kostumo dancis kantante nederlandajn kantojn en Esperanta traduko.

Kvankam mi kelkfoje vojaĝis nokte, dormante en ŝipo aŭ vagonaro, tamen restis sufiĉe da oazo vidi viajn urbojn (inter kiuj ankaŭ Stavanger) kaj landon dum taglumo. Precipe imponis min la montaro inter Bergen kaj Oslo!

La 8-an de novembro, post 10-taga restado, mi reiris, plena de impresoj pri norvegaj homoj kaj pejzaĝoj, al Danujo por daŭrigi mian interrompitan rondvojaĝon.

Mi kore dankas ĉiujn, kiuj tiel afable akceptis kaj gastigis min kaj bonvolis gvidi min tra muzeoj kaj aliaj gravaj konstruaĵoj.

Mia vojaĝo, dank' al vi ĉiuj, estas por mi neforgesebla!

F. Faulhaber.

Nordlanda Esp.kongreso

(daŭr. de p. 1)

programo kaj salutparoloj, kaj kun bona ebleco ekkoni unu la aliajn.

8. *Ferma festeno* okazos 22/6 vespere en Ingeniørenes Hus en Kronprinsensgate (ankaŭ en urbocentro kiel ĉiuj aliaj kunvenoj) kun komuna manĝado kaj diversspeca distra programo kaj danco.

Oslo, 30/12 1964.

por la Loka Kongresa Komitato
John Berggreen (prez.)

* * *

GLUMARKOJ

Prezoj:

1) *Al la nordaj landoj* — Danujo, Finnlando, Islando, Norvegujo, Svedujo: po n.kr. 0,50 por 1 folio kun 20 glumarkoj *krome la afranko* kiu estas:

por 1—12 folioj n.kr. 0,30
(pezolimo por la nordaj landoj)
por 13—30 folioj n.kr. 0,40
(pezolimo por la nordaj landoj)
por 31—60 folioj n.kr. 0,60
(pezolimo por la nordaj landoj)
por 61—150 folioj n.kr. 0,90
(pezolimo por la nordaj landoj)
por 151—300 folioj n.kr. 1,30
(pezolimo por la nordaj landoj)

La nordaj landoj povas ankaŭ uzi la pagmanieron pere de internaciaj *respondkuponoj*, kiu estas deviga por la aliaj fremdaj landoj, laŭ la preztabelo sube menciita:

2) *Preztabelo por eksterlando:*

1 internacia respondkupono = n.kr. 0,90. — La prezoj estas *inkluzive la afrankon eksterlanden*, jene:

1 internacia respondkupono valoras 1 folion kun 20 glum. (aŭ n.kr. 0,90)
2 internaciaj respondkuponoj valoras 3 foliojn (aŭ n.kr. 1,80)

3 internaciaj respondkuponoj valoras 5 foliojn (aŭ n.kr. 2,70)
4 internaciaj respondkuponoj valoras 7 foliojn (aŭ n.kr. 3,60)
5 internaciaj respondkuponoj valoras 9 foliojn (aŭ n.kr. 4,50)
6 internaciaj respondkuponoj valoras 11 foliojn (aŭ n.kr. 5,40)
10 internaciaj respondkuponoj valoras 20 foliojn (aŭ n.kr. 9,00)
15 internaciaj respondkuponoj valoras 30 foliojn (aŭ n.kr. 13,50)
20 internaciaj respondkuponoj valoras 40 foliojn (aŭ n.kr. 18,00)
25 internaciaj respondkuponoj valoras 50 foliojn (aŭ n.kr. 22,50)
50 internaciaj respondkuponoj valoras 100 foliojn (aŭ n.kr. 45,00)
100 internaciaj respondkuponoj valoras 200 foliojn (aŭ n.kr. 90,00)
150 internaciaj respondkuponoj valoras 300 foliojn (aŭ n.kr. 135,00)

4-a Internacia Kultura Semajno en «Grésillon»

La 4-a Paska Kultura Semajno, sub la aŭspicioj de la Ministro pri Franca Edukado, okazos de la 7-a ĝis la 16-a de aprilo 1965 en la kastelo «Grésillon», Baugé (Maine-et-Loire).

Eminentaj esperantistoj prelegos pri diversaj temoj precipe kulturaj, kaj praktikaj kursoj, ludoj, distraj vesperoj okazos dum tiu semajno.

Oni ankaŭ oferdonos, dum tiu epoko, senpagan restadon al 5 eksterlandanaj gejunuloj.

Petu klarigon pri la kosto de la restado, kaj pri rabatoj por la fervojoj ĉe:

Château de Grésillon — BAUGÉ
(Maine-et-Loire) — France.

René Llech-Walter,
Prez. de Franca Unuiĝo
por Esperanto.

Rolf Bugge-Paulsen 70-jara

La fidela kaj fervora probatalanto por Esperanto, emerita kapitano de infanterio, Rolf Eigil Bugge-Paulsen, de geamikoj konata kiel «Kapitano» kaj «Robopo», naskiĝis en Bergen la 11an de decembro 1894.

Li esperantistiĝis en la jaro 1907 kiam li estis mezlerneano en la dua klaso. Iun tagon lia patro alportis hejmen la malgrandan ŝlosilon de Esperanto, kaj li tuj komencis studi ĝin, kaj poste li traĝis la lernolibron de Skeel-Gjørling.

Koncerne lian multflankan laboron por Esperanto, ni ĉi tie povas mencii nur la ĉefajn trajtojn. Li fariĝis prez. de NEL 1919—34 kaj 1937—47, komitatano A de UEA 1922—62, ano de la Ekzamena Komisiono de NEL 1921—1941, ano de Lingva Komitato (nun Akademio de Esperanto) de 1932. Bugge-Paulsen restarigis Norvegan Esperantiston kaj estis ĝia redaktoro aŭ kunredaktoro 1922—24 kaj 1932, kaj li estis komisiito de NEL pri radio kaj interŝtataj organizaĵoj. Li ĝis nun partoprenis preskaŭ 20 UK, el kiuj la plej multaj kiel reprezentanto de la norvega registaro.

Bugge-Paulsen faris sennombrajn paroladojn por Esperanto, multajn radioparoladojn kaj gvidis la unuan Esp.o-kurson per radio en Norvegujo vintre 1928—29. Li ankaŭ gvidis multajn kursojn, i. a. 7 en Svedujo. En 1930 li preparis la kurson de Andreo Cseh ĉe la universitato en Oslo, kaj en 1931 li fondigis klubon inter la policistoj en Oslo.

Li verkis aŭ eldonigis plurajn propagandilojn kaj lernolibrojn, i. a. radiovortaron norvegan-Esperantan-anglan (1925—29), la 2an kaj 3an eldonojn de la norvega ŝlosilo (1934, 1956), verkis la norvegajn prilaboraĵojn de la lernolibro de Seppik-Malmgren (1935, 1938, 1947, 1955).

Bugge-Paulsen ankaŭ redaktis konstantan radiorubrikon en la programrevuo «Radiobladet» (1932—40), kaj «Faktoj pri Norvegujo» (1953). Li tradukis la libron «La skulptaĵoj sur la Vigeland-ponto» (1951) kaj preparas nun Norvegan-Esperantan poŝvortaron. — Bugge-Paulsen en 1956 vizitis Strasburgon kiam la kultura komisiono de la Eŭropa konsilantaro traktis Esperanton, kaj li estas konsilanto de Nordlanda Esperantokomitato de 1960. Li ankaŭ kolektis membrojn por la Internacia Patrona Komitato de la Zamenhof-jaro 1959 kaj proponantojn de UEA por la Nobel-premio.

En 1951 li fariĝis komandoro 2 de PRO MERITO.

Sincerajn kaj varmajn gratulojn kaj bondezirojn al la jubileulo!

LKH

Halvdan Karterud 70-jara

El la nunvivantaj norvegaj blinduloj Halvdan Karterud estas unu el la plej multflanka ne nur laŭ talento, sed ankaŭ laŭ edukado. Li naskiĝis en Løten la 4-an de decembro 1894 kaj venis al la blindula lernejo en Kristiano en 1904. Tie li restis ĝis 1912, kaj la saman jaron li prezentis sin al plena orgenistekzameno ĉe la muzikkonservatorio en Kristiano. En 1913 li komencis studi ĉe Elverum lærerskole kaj faris en 1916 unu el la plej bonaj instruistekzamenoj de tiu jaro. La venontan jaron li plenumis la aldonan provon por la mezlernejo, kaj la saman jaron li komencis kiel instruisto ĉe Dalen blindesko en Trondheim. En 1919—21 li estis prez. de «Norges Blindeforbund» kaj ĝia sekr. dum multaj jaroj. Plue Karterud estis prez. de «Nordenfjeldske Blindeforbund» 1922—46 kaj 1955—60.

Karterud interesiĝis pri Esperanto

jam en 1906, sed nur post la kurso de f-ino Rosa Bye kaj s-ro Ole B. Sletterød en 1910 li fariĝis vera esperantisto. Li iniciatis la Esperantorubrikon en la organo de Norges Blindeforb., «Norges Blinde» (1925—30), kaj la brajlan Esperantogazeton «Antaŭen» (1932—35). En 1933 li sukcesis enkonduki Esperanton kiel devigan temon ĉe Dalen blindesko en Trondheim. Dum la UK en Stokholmo 1934 Karterud estis kunfondinto de Norvega Asocio de Blindaj Esperantistoj (NABE) kaj fariĝis ĝia unua prezidanto. Li ankaŭ estis vicprez. de Universala Asocio de Blindulorganizaĵoj (UABO) kaj prez. de Grupo Esperantista de Trondheim 1950—51.

En 1948 Karterud transskribis en brajlon la perkorespondan kurson de N.E.L., kaj de tiam li gvidis la perkorespondan instruadon inter la blinduloj. Li ankaŭ transskribis en brajlon la libron de Omelka: «La Alaska Stafeto» (1961).

Karterud ricevis la Arĝentan Stelon dum la UK en Varsovio 1937, fariĝis Kavaliro 2 de PRO MERITO 1951, kaj fariĝis honora membro de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE) 1953 kaj de Grupo Esperantista de Trondheim 1957.

Akceptu niajn plej korajn salutojn kaj gratulojn!

LKH

Szilágyi 70-jara

La 1-an de februaro D-ro Ferenc Szilágyi, Borás, estis 70-jara. Kiel lia nomo indikas, li estas hungaro, sed estas nun sveda ŝtatanano.

Szilágyi estas tre konata nomo en la Esperanta literaturo. Li verkis plurajn librojn, el kiuj ni menciu nur «La Granda Aventuro», «Inter Sudo kaj Nordo», «Mistero Minora». Li faris multajn kursojn (ankaŭ laŭ propra «Adamson-metodo») kaj pre-

legojn. Li ofte kontribuis al Norvega Esperantisto. Li estas ĉefredaktoro de la nordlanda revuo por literaturo kaj kulturo «Norda Prismo». Sed antaŭ ĉio li estas afabla, bonhumora, kulturoriĉa kaj korvarma homo. — Ni kore gratulas nian karan amikon!

JHR.

La monkolekto al la Informfondaĵo de NEL.


La kolekto progresas, sed iom tro malrapide. Ni bezonas la helpon de ĉiu serioza esperantisto en Norvegujo por ke la afero sukcesu!

La Alvoko pri Esperanto, kiun subtenis tiel multaj konataj esperantistoj kaj oficialuloj simpatiantaj, estas bona bazo por petoj pri monapogo al Esperanto. Sed la unuopaj esperantistoj aŭ la klubestraroj devas persone turni sin al lokaj donacantoj supozeblaj. La esperantokluboj havas jam sufiĉe da Alvokoj kaj subskribitaj petskriboj kiujn oni povas uzi por tiu celo.

La 5-kronrulado al la Informfondaĵo de N.E.L. oni ne miskomprenu: Ne temas pri provoko, sed ĉiu intereso nur sendu sian 5-kronon al poŝtĝirokonto 20.02.80 (Norsk Esp.o-Forbunds Opplysningsfond, postboks 942, Oslo). Donacojn oni ankaŭ povas sendi al bankĝirokonto 100.000/40 sub sama adreso.

La kluboj espereble aranĝos ellotumadojn, pakaŭkciojn, kafobursojn k. s. por la sama celo. Klubo Esperantista en Oslo pere de pakaŭkcio la 3-an de decembro kolektis kr. 175,—. Ni samtempe sciigas ke ĝis nun donacis jenaj komunumestraroj: Namskogan, Kongsberg kaj Samnanger, kaj multaj informis ke oni pritraktos la petskribon en poste kunveno. Tio ĉiokaze havas grandan informadvaloron por Esperanto, ĉar la petskribo estas tiumaniere pritraktata

På norsk



Esperantister fra mange land til Oslo

Det ser ut til at Den Nordiske Esperantokongress i Oslo i juni ikke bare kommer til å samle deltakere fra de nordiske land, men at det også vil bli mange gjester fra Esperantoforbundene i land utenfor Norden.

Blant de ikke-nordiske deltakere er presidenten for Verdensforbundet for Esperanto, professor Ivo Lapenna i London. Prof. Lapenna har lovet å holde festtalen ved åpningen av kongressen.

Internasjonal kongress i Hamar i mai

Den 17. Internasjonale Esperantokongress for Jernbanefolk skal holdes i Hamar i dagene 21.—28. mai.

Kongresskomiteen har nå offentliggjort et foreløpig program for kongressen i Esperanto-pressen. Foruten årsmøte i jernbanefolkens internasjonale Esperanto-forbund blir det faglige foredrag og besøk på Jernbanemuseet, NSB's verksted og Hedmarksmuseet. Om søndagen skal det være protestantisk gudstjeneste på Esperanto i Hamar Domkirke ved

en 525 komunumestraroj kun pli ol 10000 membroj (en la konsilantaroj)!

Krom tio ni ricevis kelkajn 100-kronajn donacojn de privatuloj. Nun ni atendas la grandajn sumojn de riĉuloj aŭ de firmaoj, tiel ke la Informadfondaĵo de N.E.L. kresku sufiĉe multe.

Ni dankas provizore al tiuj kiuj helpis nin kaj esperas pri bonaj rezultoj estontaj.

Oslo, en decembro 1964

por la Financa Komisiono de N.E.L.

John Berggreen

pastor Hans Amund Rosbach og katolsk gudstjeneste i Sankt Torfinns kirke ved sogneprest Duin. Det blir arrangert flere rundturer, blant annet til Elverum, hvor kongressdeltakerne skal være til stede når den nye Esperanto-gata får sine navneskilt. For øvrig blir det internasjonalt ball, teateraften og konsert i Hamar Domkirke.

Språkspørsmålet i reiselivet.

Det internasjonale akademi for turisme holdt nylig årsmøte i Lausanne. Etter en livlig diskusjon om reiselivets språkproblemer ble det vedtatt å gjennomføre en omfattende undersøkelse angående bruken av Esperanto i internasjonal reisetrafikk. Da «Académie Internationale du Tourisme» overveier å ta opp Esperanto i sin internasjonale fagordbok, vil det bli lagt særlig vekt på resultatet av undersøkelsen, som skal forelegges neste årsmøte høsten 1965. Det er redaktøren i «Welt auf Reisen», dr. Hj. Unger i Zürich, som skal lede undersøkelsen.

Flere hundre reisetrafikkforeninger, turistforeninger, statsbaner og dampskipsselskaper har alt lenge benyttet Esperanto i sin virksomhet.

Første norske Esperanto-vei

En undersøkelse som nylig er offentliggjort i England, viser at i alt 238 offentlige gater, veier, parker og plasser i 21 land har fått navn etter det internasjonale språket Esperanto. Av disse har Frankrike 44, Italia 31, Bulgaria 22 og Tyskland 20. I Skandinavia har vi hittil bare hatt Esperantoplassen i Göteborg; men nå er Norge kommet etter med «Esperantovegen» i Jørpeland, og til våren skal Elverum innvie sin Esperantogate i sammenheng med Jernbanefolkens Internasjonale Esperantokongress i Hamar,

La novjarkanto de Brorson

*Kantu, ĝoju, mia kor',
laŭdu Dion, mia lango,
kantu pri la am' kaj sango
kaj pri l' nomo de l' Sinjor'.
Ĉio kantu nun en ĝojo,
laŭdon diru al Savant',
ĉar sur paradiza vojo
sonas la novjara kant'.*

*Ho, vi sanga, sankta nom',
elaĉeta la aŭroro,
releviĝo de l' Sinjoro,
de l' laculo hejma dom',
venkstandardo de la fido,
ankra grundo de l' esper',
dum la vivo lum' kaj vido
ĝis la lasta hor' sur ter'.*

*Ho, vi dolĉa nom' Jesu'!
Nom' tutplena nur de beno,
al spirito la haveno,
al la koro vera ĝu',
la sopiro de l' animo,
el ĉielo la trezor',
forto dum mizer' kaj timo,
lum' tra morto kaj dolor'.*

*Tiun nomon portis li
je la nia ĝu', konsolo,
sed jam frue laŭ Di-volo
la dolorojn donis ĝi.
Jam je l' sanga cirkumzido
dum la oka vivotag'
li fariĝis al ŝafido
de dolora ofer-ag'.*

*Tial tiu nomo nun
plena de ĉiela graco
helpas min el la malpaco,
liberigas el la pun'.
Se mi nur Jesuon fidas
en la kredo kaj fidel',
eĉ tra monddetruo gvidas
tiu nomo al ĉiel'.*

*Nur pekulo estas mi,
tio estas la titolo
kiun donas Dia volo,
kiun donas leg' de Di'.
Sed, ĉar Vi Jesuo estas,
la mizero kaj la pun'
estas Via, kaj mi restas
sankta di-infano nun.*

*Juĝa tag' ne tondras plu,
al eterna viv' kaj bono
iros mi kun bela krono,
regos kune kun Jesu'!
Blankan veston, palmfolion,
akvon el la viv-river',
pro Jesua nomo ĉion
ĝuos mi post viv' sur ter'.*

*Tian nomon, ho Sinjor',
portis vi al mia bono,
tiu Via riĉa dono
estu ĉiam en memor'.
Kaj sur mia morto-lito
pri Jesuo la parol'
helpon donu al spirito,
estu ĝojo kaj konsol'.*

Trad. H. A. Rosbach

RECENZOJ

El Islando

Thorsteinn frá Hamri: Sub stelo rigida. — Prologo kaj traduko de Baldur Ragnarsson. Kovrilo kaj 8 dekoracioj de Asta Sigurdardóttir. STAFETO: Beletraj Kajeroj, 21. — J. Régulo, Eldonisto, La Laguna, Kanariaj Insuloj, 1963. 12 × 19 cm, 132 p. — Prezo: 1,20 usonaj dolaroj (aŭ egalvaloro).

Thorsteinn Jónsson frá Hamri nomigas juna talenta poeto islanda, kiu malgraŭ siaj junaj jaroj jam havas post si 3 poemarojn: En nigra kitelo 1958, Donaco por nova mondo 1960 kaj Lando de vivantoj 1962.

La tempo dum kaj post la lasta mondmilito estis kvazaŭ revolucio por la antaŭe preskaŭ izolita mont-insulo meze inter la malnova kaj nova mondoj. Tio montriĝis ne nur en la sociala vivo de la lando, sed ankaŭ sur preskaŭ ĉiuj kampoj de industrio kaj komerco. Ankaŭ la poezion influis ĉi tiu Ragnarok. Thorsteinn frá Hamri rompas kun la firme ĉarpentita verskonstruo de la islanda liriko: la formalismo, rigora aliteracio kaj implikita rimaranĝo kaj serĉas novajn vojojn. Tio ĉi okazas samtempe kun la transloĝiĝo el la kamparo al la urboj, kio en certa grado faras la junularon senradika kaj necerta. Ĉio ŝanĝiĝas, ĉio fluas. Ankaŭ la tuta malnova mondo kaj antaŭa mondbildo ŝajnas en dissolv-iĝo. Ĉio ŝajnas ripozi sur erupcionta vulkano, ĝuste kiel lia propra viv-koncepto kaj la saga-insulo mem kun ĝia mil-jara historio.

Li renkontiĝas kun la pratempa fabelaro, la vikingoj kaj la proskribitoj (arbaruloj). Jes li mem ŝajnas esti proskribito, senhejma kaj pelita en novan danĝeran mondon, danĝer-

an sed ankaŭ plenan de promesoj. La poezio savas lin kaj donas al li sonĝojn:

«En mond' mirega de l' vastej'
arbaron havis mi.
Elpaŝu el la ombro
sed gvidu min longen pli
sed mi vin gvidu en la vastejon,
arbaron de magi'.
Mi gardos vin kontraŭ la lupo
timigas la hurla kri'
la blov' diros al vi rakontojn
pri gnom' en la validili'
kaj ni kuŝos, ni du, sur folioj.»

Ĉi tiun poemon mi (rekte el la islanda originalo) provis redoni en la norvega jene:

KOM.

I eventyrheimen, austanom mâne
ätte eg ein skog.
Kom deg utor skuggane
så følgjes vi åt vi to
og eg skal leie deg langt bakom blâne
til mine draumars skog.
La meg passe deg for ulvane
kvass er hans klo
vinden vil seie deg soger
om dverg som i dalom bo
og vi skal liggje på lauvet.

(El la Islanda tradukis H. Fridén)

Ne ĉiuj poemoj estas tiel facile kompreneblaj kiel ĉi tiu. Sed la verko valoras zorgan trastudon. La traduko de Baldur Ragnarsson tre bone kaj fidinde redonas la enhavon kaj ritmon de la versaĵoj, kion mi eltrovis post tralego de la islanda originalo: «Tannfé handa nýum heimi». Poemo estas antaŭ ĉio muziko kaj ritmo, ja kvazaŭ speco de danco, kaj ĉiu lingvo havas sian propran, por tiel diri, «melodion». — Nur kelkaj rimarkoj: vortkonstruoj kiel «eltutis» ŝajnas iom misteraj kaj eble povus esti anstataŭigataj per aliaj. Ĉu ne «kelkan mireton kiel donacon» estas «mir-

donaceton»? Inter la ceteraj poemoj menciindaj estas: Sango defias vin dancanto, Ventego, Ĉe la trinkloko k.t.p.

La bela libro estas ornamita per la originalaj kaj impresaj desegnoj de Asta Sigurdardóttir, edzino de la poeto kaj mem verkistino.

La islanda lingvo estas pranorvega aŭ skandinava enmigra lingvo, kiu estis parolata preskaŭ en tuta Skandinavio kaj Anglujo je la tempo de la vikingoj. Depost la 800—900 jaro ĝi preskaŭ ne ŝanĝiĝis. En 1940 dum la milito mi estis en Dalarne, meze de Svedio. Tie mi trovis dialekton tre diferenca de la ordinara sveda lingvo, verŝajne miksitajn kun finnaj vortoj. Granda estis mia surprizo en la islanda lingvo retrovi la vorton «tungelljos», kiun mi tiam kredis esti finna. Kiel kuriozaĵo mi povas menci ke la islanda kiel Esperanto ne havas nedifinitan artikolon.

Henry Fridén

50-a Universala Kongreso de Esperanto

Tokio 31/7 — 7/8 1964

Sub la Alta Protektado de D-ro Yuji Shibata,
Prezidanto de la Japana Akademio

LOĜADO EN TOKIO

La Loĝiga Servo rezervis litojn en diverskategoriaj hoteloj por la partoprenantoj en la 50-a U.K. La prezoj en eŭropstilaj hoteloj estas de ĉ. 12,- ĝis 20,- ned. gld. (48—80 st.). En japanstila komuna loĝejo estas je dispono limigita nombro da litoj, kaj la prezo estas ĉ. 8,- ned. gld. (32 st.). La prezoj ne inkluzivas matenmanĝon.

EKSKURSOJ

La Ekskursiva Servo aranĝis du tuttagajn ekskursojn resp. al Nikko kaj

al Hakone. La prezo de ambaŭ ekskursoj estas 35,- ned. gld. (140 st.). Dum la kongresa semajno okazos ĉiun tagon vizito al Tokio. La prezo de la ekskurso estas 8,- ned. gld. (32 st.).

Postkongresaj aranĝoj okazos en Kioto (Oficiala Postkongreso), Hiroŝima kaj Kameoka.

KOTIZOJ

Post la 1-a de januaro 1965 la aliĝkotizoj estos jenaj:

Kongresano	55,— ned.gld. (220 st.)
Edz(in)o	27,50 ned.gld. (110 st.)
Junulo ĝis 20 jaroj	21,— ned.gld. (84 st.)
Universitata Studento ĝis 30 jaroj	34,— ned.gld. (136 st.)
Blindulo	27,50 ned.gld. (110 st.)

FOTO-KONKURSO

En kunlaboro kun la konata fabriko de foto-materialoj FUJI, okazos en la kadro de la 50a U. K. de Esperanto granda Foto-konkurso kun riĉaj premioj. La temo de la konkurso estas «Virino». — La premioj je dispono de la gajnintoj konsistos el:

- 1a premio: 100 ned. gld. plus foto-aparato
- 2a premio: 70 ned. gld. plus projekciilo por lumbildoj
- 3a premio: 40 ned. gld. plus projekciilo por lumbildoj
- 4a premio: Projeciilo por lumbildoj.

Detaloj pri la Foto-Konkurso aperis en la novembro eldono de la revuo «Esperanto», p. 195.

GLUMARKOJ

Ĉe la Libro-Servo de UEA kaj ĉe la Landaj Asocioj estas aĉetebla speciala glumarko pri la 50-a U. K. de Esperanto. La glumarko estas eldonita en du diversaj formatoj:

Folio kun 10 glumarkoj (4 × 4 cm):
0,40 ned.gld. por 1 folio (1 rpk).

Folio kun 4 glumarkoj (5 × 5 cm):
0,40 ned.gld. por 1 folio (1 rpk).

POSTKONGRESO

La Oficiala Postkongreso okazos de la 8a ĝis la 13a de aŭgusto 1965 en Kioto kaj Nara. La aliĝkotizo, kiu inkluzivas loĝadon en moderna eŭropstila hotelo, du tuttagajn ekskursojn, tagmanĝon dum la menciitaj ekskursoj, vojaĝon per «super»-rapida vagonaro Tokio—Kioto—Tokio, enirprezojn al diversaj vidindaĵoj kaj aliajn programerojn, estas 220 n. gld.

TUTTAGAJ EKSURSOJ

Por doni la eblecon, speciale al la eksterlandaj kongresanoj, profiti kiel eble plej multe de la restado en Japanujo, la Ekskursiva Servo fiksas tuttagajn ekskursojn al Nikko kaj al Hakone je la 5-a kaj je la 8-a de aŭgusto 1965. La kotizo por ambaŭ ekskursoj estas po 35,- ned. gld. (140 steloj).

STATISTIKO

(ĝis 14/12-64): Arg. 4, Aŭstralio 19, Aŭstrujo 7, Bahamoj 2, Belgujo 7, Brazilio 9, Britujo 40, Bulgarujo 11, CAR 1, Ĉeĥ. 1, Dan. 14, Finnlando 4, Fr. 74, Ger. 39, Hind. 1, Hispanujo 6, Hongk. 2, Hungarujo 5, Irl. 1, Isr. 2, Ital. 26, Jap. 119, Jug. 10, Kan. 2, Mar. 2, Meks. 2, Mon. 2, Ned. 31, Norv. 6, NovZ. 5, Pol. 13, Portug. 1, Rum. 1, Sved. 37, Svis. 9, Urug. 3, UAR 1, USA 29, Venez. 3.

Entute: 551 el 39 landoj.

KLUBA JUBILEO

«Mara Vento» en Haugesund estas 30-jara la 16-an de januaro.

Mortis Johan Sandersen

Ĉefkonduktoro Johan Hartvig Sandersen mortis la 19an de decembro post longa kaj dolorega malsano, ĝuste kiam li pensiite povus ĝui pli facilan vivon.

Johan Sandersen fariĝis Esperantisto en 1927 kaj aliĝis al Halden Esperantoklubo Ascendo en 1946. — Li estis kavaliro de la klub-ordeno «Verda Ŝlosilo», fariĝis sekretario en 1950, vicprezidanto en 1956 kaj ree sekretario en 1963.

Li krome estis membro de Norvega Esperanta Fervojista Asocio. Li partoprenis multajn kongresojn de UEA kaj IFEL.

Ni ĉiam memoros lin kiel la gastaman, afablan samideanon, ĉiam pretan helpi, kiam la cirkonstancoj tion postulis.

H. F.

La Internacia Akademio de la Turismo oficiale enketas pri Esperanto

La «Internacia Akademio de la Turismo», patronata de la Princo Rainier III. de Monako, havis lastatempe sian Ĝeneralan Kunvenon en la svisa urbo Lausanne. La Konsilantaro de la Akademio ekzamenis kaj diskutis proponon rilate al Esperanto kaj decidis: komisi D-ron Hj. Unger en Zürich, fari internacian enketon kaj postan raporton pri la praktika uzado de Esperanto en la tutmonda turisma sfero kaj prezenti proponon pri eventuala adopto de Esperanto en la Internacia Faka Vortaro de la Turisma Akademio.

D-ro Hj. Unger (Zürich 22, Svislando) estas Prezidanto de la «Svisa Unuiĝo de la Turismo-jurnalisto» kaj ĉefredaktoro de la germanlingva turista revuo «Welt auf Reisen».

Norvega Kroniko

Red.: Karsten Langsholt

Klubo Esperantista en Oslo.

5/11. La prezidanto John Berggreen malfermis la kunvenon kaj bonvenigis nian nederlandan gaston s-ro F. Faulhaber. Li petis lin kunporti al la esperantistaro en Amsterdamo niajn plej korajn salutojn.

La kunveno estis aranĝita kiel «Nederlanda Vespero». La tabloj estis ornamitaj per tulipanoj en lignoŝuoj, kaj sur la muroj pendis nederlandaj afiŝoj. Kelkaj klubanoj estis vestitaj en nederlandaj kostumoj, kiujn permane kudris nia klubano Aslaug Refsing. — La Kluba ĥoro kantis nederlandan kanton «En la pluvo», amuze asistita de la du junuloj Torill Jensen kaj Harald Bowitz, ĉiuj en kostumoj.

La ĉefpunkto de la programo estis prelego de nia nederlanda gasto F. Faulhaber: «La Esperanto-literaturo kiel interligilo». Li diris ke la klasika literaturo, greka, latina kaj alilanda estis kaj estas la kultura interligilo inter la homoj. La esperantistaro devas tiel bone koni la esperantan literaturon ke ankaŭ ĝi estu la sama kultura interligilo. Ekz. li menciis la verkojn — precipe la poemojn de Zamenhof — de kiaj oni jam nun ĉerpas citaĵojn konatajn de la plimulto. La lingvo vivas tiom kiom ĝi estas uzata — do, oni devas uzi ĝin lege, skribe kaj parole. La esperanta literaturo estas nia spirita posedaĵo. La septaga kunestado dum la internaciaj kongresoj estas unu el niaj plej bonaj okazoj por uzi la lingvon tiel ke ĝi povas penetri en niajn pensojn. Ankaŭ korespondado estas tre utila rimedo.

La prez. dankis al s-ro Faulhaber pro la tre interesa kaj bone prezentata prelego.

Post la kafopaŭzo la Kluba ĥoro kantis «Vizitante Regensburĝon», kaj poste s-ro Faulhaber legis el sia libro «La mondo ne havas atendejon».

16/11. La prez. bonvenigis la ĉeestantojn kaj referis leteron de Thor Heyerdahl en kiu li dankis pro la saluto okaze de sia 50-jara naskiĝtago. L. Anjer klarigis pri la kolekto de subskriboj rilate al la propono al Unuiĝintaj Nacioj okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro. Li ankaŭ respondis al kelkaj demandoj. — La klubanoj kantis la du novajn kantojn «Vizitante Regensburĝon» kaj «Tiritomba».

La ĉefpunkto de la programo estis prelego de Birgit Normann «Pri mia vizito al esperantoklubo en Germanujo». Ŝi akompanis sian prelegon per multaj belaj kaj bonaj kolorlumbildoj de la diversaj lokoj kiujn ŝi vizitis; precipe la bildoj de la muro en Berlino estis tre interesaj. La prelego rikoltis fortan kaj merititan aplaudon. Dum la «10-minuta lingva instruado» Otto Prytz, asistita de John Berggreen, klare kaj lerte instruis nin pri «Parolo nereкта». — La prez. denove memorigis pri la kluba lotumado, al kiu ni ricevis pluan donacon: Puvestitaĵojn donitaj de Pepita kaj Herbert de Caspary. Li ankaŭ memorigis pri la Kronulado kaj informis ke la aliĝiloj por la Nordlanda Esperanto-Kongreso en Oslo 1965 nun estas en la presejo, kaj la blankedoj estos haveblaj dum la venonta klubkunveno.

La Urso, Sarpsborg,

5/11. Rosbach raportis pri prelego pri Esperanto farita en Kulturprograma vesperrondo. Oni laboris pri la Egiptuja «sonfilmo». Fine la prez. prezentis lumbildan prelegejon «Kiel kaj kial mi fotografas».

19/11. Rosbach raportis pri prelego pri Esperanto farita en la gimnazia

asocio. Poste li prelegis pri la pentristo Toulouse-Lautrec okaze de la 100-jara datreveno de ties naskiĝo. Fine ni pretigis la surbendigon de tekstoj por la Egiptuja filmo, kiu estas tiel preta por prezentado.

3/12. En tiu lasta antaŭkristnaska kunveno estis la tradicia festena tablo, kies organizanto estas ĉiam s-ino Birch Olsen. La ĉefa programero estis lumbilda prelego de Rosbach pri Pisa kaj Firenze.

Sauda Esperantoklubb.

9/10. Ni komencis per kanto de «Postkanto», kaj la prez. bonvenigis la geklubanojn dirante inter alie ke espereble la nova laborsezono donos al ni bonajn fruktojn. — Cirkulero de NEL estis laŭlegita kaj rezultigis en vigla diskuto pri io el la enhavo. *Aret for Internasjonalt Samarbeide.* Pri tiu afero kiu estas tre ampleksa, ni jam ricevis multe da paperoj kaj presajoj. Ni decidis pritrakti ĉi tion pli malfrue en estrarkunveno kune kun J. Matland kiu tre multe sciias pri tio. — S-ino Elna Matland kaj Norman Birkeli rakontis iom pri projektitaj esp.kursoj, sed ĉu la kursoj vere ekstartos oni ankoraŭ ne scias.

La rezulto de la gazeta esperanto-kurso ne estas bona, sed ni tamen esperas ke ĝi havis bonan propagandan signifon kaj mision. La kurso komencis 3/1 kaj finiĝis 21/8.

S-ino Elna Matland rakontis kaj montris belajn kolorbildojn de sia ferio kune kun sia edzo kaj infanoj al Ĉeĥoslovakujo. Fortan aplaŭdon.

31/10 ĉe ges. Matland. Tio ne estis ordinara kunveno sed pro la alveno de la Amsterdama esp.isto F. Faulhaber. — Honore al nia gasto ges. Matland tre bele ordigis diversajn specialaĵojn nederlandajn, pendigitaj sur la muroj kaj lokigitaj sur la planko! Bildojn de mueliloj, lignajn

ŝuojn kaj t.p. Nia gasto tuj sentis sin kiel hejme inter samlandanoj.

Nia prezidanto bonvenigis lin al tiu kunveno kaj poste Faulhaber faris prelegon pri «La esperanta literaturo kiel interligilo». La prelego estis tre interesa kaj tre bone prezentita.. Ĉi tiu prelego estis laŭ li «La serioza temo», ĉar li dividis sian prelegan vesperon en du partoj, serioza kaj amuza. Nun nia dommastrino petis nin altabliĝi, kaj ni ĉiuj manĝis kun bona apetito el la diversaj bongustaj kaj delikataj manĝaĵoj. — Post la manĝo nia gasto prezentis la amuzan temon kiu estis legado el lia tradukaĵo «La papalagoj». La enhavo en tiu ĉi libro estis vere amuza. Ĝi pritraktas indiĝenon vizitinte Eŭropon, kiu poste rakontas pri siaj travivaĵoj en nia civilizita mondo. Post la legado, kiu donis fortan aplaŭdon, li amuzis nin pri diversaj malgrandaj rakontoj kaj cetere viglan interparolon daŭrigis ĝis estis tempo por fini ĉi tiun interesan vesperon.

Ascendo, Halden.

12/10 estis kunveno ĉe gesinjoroj Fridén. 7 anoj ĉeestis. — Pritraktitaj estis skriboj, monokolekta kampanjo kaj kvaronjara raporto. Oni opiniis, ke «almozpetado» ne estas la plej konvena formo por monokolekto por Esperanto. Estas jam sufiĉe da tiaj kolektoj en aliaj kampoj. Oni ne povas klasigi sin en la sama kategorio kiel la sanitaraj aŭ humanecaj movadoj, kiuj celas helpi malsanan homojn aŭ kunhomojn en mizero. La plej bona metodo por Esperanto certe estas la lotumado. La publiko devas ricevi ion palpeblan por sia elspezo.

Estis decidite sendi florojn al samideano Johan Sandersen, kiu estas tre malsana. — La prez. admonis la klubanojn sendi monon al la 5-krona kolekto. — Estis interkonsentite

provi komunan aranĝon kun La Urso rilate la viziton de Faulhaber.

Fine oni transiris al la kafo kaj buterpanoj, kiuj estis konsumataj dum la babilado vikle kaj vigore centriĝis pri lingvaj problemoj.

Kunveno ĉe ges.roj Olsen, Tistedal, 9/11. 7 anoj ĉeestis. Ĉar funkcianta sekr. Dahl ne povis veni, la prez. elektigis skribi la protokolon.

Kiel ĝojiga evento s-ro Emil Andreassen, la nestoro de nia klubo, 80-jara kaj «ankoraŭ viglega», partoprenis la kunvenon.

Oni uzis la libreton «Gaja leganto per Esperanto» de Schwerin kiel ilon por ekzerci la membrojn. Kelkaj spritaĵoj kun posta demandaro montrigis tre konvena kaj instrua.

Post regalado per bulkoj kun delikata surmetaĵo, kafo kaj kukoj, fare de la mastrino, la gastiganto veturigis hejmen per sia aŭto.

«Mara Vento», Haugesund,

kunvenis 1/10 ĉe «OTTO». — Post kelkaj bonvenigaj vortoj de la prez. ni kiel kutime komencis per kanto.

S-ano Johs. Sortland prezentis ĉifoje la duan parton de sia programo pri la kongres-vojaĝo. Per plaĉ-kolora filmo ni ekkonatiĝis al belaj partoj de Danlando, Germanio kaj Nederlando krom Norvegujo, kaj eksciis pri parto de la travivaĵoj kiujn dumvoje havis la vojaĝanta deko. Per akompana rakontado li revivigis al ni impresojn kaj spertojn akiritajn en la koncernaj urboj kaj landoj. — Estis programo interesa kiun la geklubanoj danke aplaŭdis.

Aldone al la perbilda kaj -vorta vojaĝ-priskribo de s-ano Sortland, la prez. rakontis pri la Universala Kongreso de Esperanto en Hago donante fragmentojn de la impona vico da programeroj kaj priskribante kelkajn el la plej gravaj kaj elstaraj kongres-aranĝoj.

Skudeneshavn kaj Skudenes

kunvenis 2/11. La klubo havas 8 anojn, 6 el ili ĉeestis. La aliaj estis malhelpitaj de aliaj aferoj.

La kunveno okazis en la domo de s-ino Torkelsen. — La konata nederlandano, F. Faulhaber, vizitis la klubon, kaj li ankaŭ faris la programon. Antaŭ la kafopaŭzo s-ro Faulhaber surbendigis artikolon de s-ro Wensing el revuo «Esperanto» kaj prelegis pri la interliga valoro de la Esperanto-literaturo — ankaŭ tiu prelego estis surbendigita. — Post la kafopaŭzo estis legataj — de Faulhaber — tri amuzaj rakontoj, kiuj estis tradukataj en la norvegan lingvon de Hanson kaj Mjøllhus.

Fine oni decidis havi klubkunvenon ankaŭ proksimsemajne kun studronda horo.

Estis tre utila kaj interesa kunveno.

La Esperantoklubo de Bergen.

S-ino Nelly Bjørge Nilsen invitis la membrojn al sia hejmo 29/10, la datreveno de la klubo.

La prez. parolis pri la klubo kaj pri esperanta laboro. Poste sekvis la kanto de la klubo, verkita de Johs. Jahren. — La sekretario legis alvenintajn salutojn al la klubo kaŭze de la datreveno. — Kelkaj membroj atingis kaj ekhavis la kluban ordenon pro longa membreco kaj fervora laboro klubo. La prez. gratulis ilin, kaj esperis daŭrigan intereson por la klubo. — La sekr. legis poemon, kiun li iam en la pasinteco verkis, kaj skribis en la klubgazeto «La Lumturo». Per sonrubando ni revivigis la jubilean feston.

La gastigantino regalis per bonaj kukoj kaj kafo. Ni multe kantis, kaj kune gaje interparolis ĝis meznokto.

La 30-jara festo 24/10.

La prez. Agnes Hennemann bonvenigis salutis la ĉeestantojn, kiuj ĉirkaŭis

post la prezentado. — Intertempe la gejunuloj ludis kaj dancis ĝis la fino. Entute festa vespero en bona kaj digna atmosfero.

La Norda Lumo, Tromsø.

21/10 la klubanoj renkontiĝis en la hejmo de la prezidanto H. Olsen, kie ni pritraktis la vintran laboron. La prez., kiu estas popollerneja instruisto kaj ano de B.U.L. en Tromsø, sciigis pri starigo de studrondo en B.U.L. uzonte N.E.L.s Esperantokurson ĉe Folkets Brevskole. Ni ankaŭ iomete diskutis la «Proporon okaze de la Jaro de Internacia Kunlaborado».

11/11 ni renkontiĝis en la hejmo de s-ro Ebeltoft kie ni daŭrigis la preparan laboron. La studrondo en BUL. jam funkcias kun 8 partoprenantoj, kaj la unua lernoletero jam estas tralegata. Oni decidis ke ni provus interesigi la kursanojn tiel ke ili eble aniĝas en la klubo ĉi-tie.

la bele ornamitan tablon. Ŝi per belaj vortoj memorigis la geklubanojn kiuj dum la 5jara periodo estis mortintaj. Post la memoriga silento sekvis plane Lulilkanto de Mozart. Tiam ŝi donis la vorton al la festgvidanto Elsa Njøten. — Kjell Offerdal verkis festan prologon, kaj senteme ĝin prezentis. Poste sekvis «La Himno». — Leonora Christensen parolis pri la intervala periodo, pri faritaj kaj nefaritaj agadoj. Ŝi esperis pli bonan sukceson, progreson kaj prosperon estontece. Kristian Sivertsen parolis pri la virino, kaj poste sekvis la kanto pri ŝi. Elsa Njøten responde kvitancis, kaj parolis pri la viro.

Nia bona haugesunda amiko Olav Thormodsen transdonis gratulajn salutojn de «Mara Vento» kaj de NEL, kaj fine esprimis esperon, prosperon kaj bonfarton por la klubo kaj Esperanto. — Sekvis eksterlandaj salutoj: Kjell Offerdal de Hamburgo kaj Saragozza. Nelly Bjørge Nilsen de Anglujo. Majken Wagle Jørgensen de California.

Bona atmosfero regis ĉe la tablo. Ni multe kantis kaj gaje Esperantokaj norveglingve interparolis. Fine Magnus Klyve per bonelektitaj vortoj dankis pro la manĝo. Unisone ni dankis per: Pro la manĝo dankon, ni ne trovis mankon.

Ni kolektiĝis en la salonoj. S-ino Nødtvedt kantis norvegajn kantojn, niaj propraj membroj prezentis kantojn, rakontojn, kaj unisone ni kantis festkantojn. Malnovaj esp.geamiko renkontiĝis ĉe la tabloj, kaj ili fervore interparolis pri esperantaj travivaĵoj en la klubo. Ges.roj Jahren verkis dialogon en kiu ili revivigis antaŭajn travivaĵojn. La fervora geedzparo rikoltis meritan aplaŭdon

Norsk Esperanto-Forbund (*Norvega Esperantista Ligo*)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30
Kontoradrese: Nedre Slottsgt. 3 III, Oslo
Telefon: 42 47 79
Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30—16.30

Turisma Servo: Boks 942, Oslo.
Postgiro 100.32

Esperantoforlaget A/s (*Eldonejo Esperanto A/s*)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31
Kontoradrese: Nedre Slottsgt. 3 III, Oslo
Telefon: 42 47 79

Ĉefdelegito de U. E. A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,
Oslo-Bryn. Postgiro 133.29

La redakcio:

Privata adreso de la ĉefredaktoro:
Johan Hammond Rosbach,
C. E. Holters vel 7 C, Sarpsborg: - Uzu tiun
adreson, kiam temas pri urĝaj sendaĵoj.
Telefona: 54 7 27